

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Abono (pór dek du numeroj) :

Box 731F, Elizabeth-str. P.O.,

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.

Melbourne (Aŭstralio).

Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

Nro 80 (Seventh Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 februaro 1927

"SINJORO DELSUDO" REVENAS.

Revenis al Melbourne, post kvinjaraaresto en Nov-Gineo, sinjoro Maŭrico Hyde, kiu antaŭe okupis elstaran lokon en nia movado en tiu ĉi urbo. Sinjoro Hyde estis prezidanto de nia asocio kaj unua redaktoro de tiu ĉi gazeto, en kiu foje aperis artikoloj pri sub la pseŭdonimo A. Delsudo.

En lasta tempo sinjoro Hyde faris rapidan veturon ĉirkaŭ la mondo, kaj iam rakontis ĝin al ni en la jena parolo:

—Vi jam legis en la 'Suda Kruco' pri la malgranda karavano kiu presertu pereis sur la maro, kiam la Norvega ŝarĝŝipo 'Tugela' frapis rifon sude de Filipina Insularo. Post du monatoj tamen mi atingis Francujon, kaj en la brua, brila urbo Marseljo mi tuj trovis utilon de Esperanto. La deligito kaj la anoj de la Esperanto-oficejo helpis min per konsiloj kaj gvidado en la kutima valora maniero. Same estis en ĉiu urbo, kiun mi vizitis, kiel en mia lasta vizito al Eŭropo antaŭ dek du jaroj.

—Al mi ŝajnas, ke la Esperantomovado en Eŭropo estas jam pli serena kaj pli praktika, ol antaŭ dek du jaroj. La ĉefajn lokojn en nia movado okupas homoj pli solidaj, kaj la nomo 'Esperanto,' se mi povas juĝi per propra malvasta sperto, estas ŝatata ĉiam kun pli granda respekto. La diversaj maniuloj, kiuj emis kompromiti nian movadon kun la propraĵaj politikaj, religiaj, socialaj teorioj, estas preskaŭ eliminataj; oni

povas diri, ke en la Esperantaj organizadoj troviĝas homoj, kiuj laboras por Esperanto sole.

—La malgranda karavano, pri kiu mi parolis, konsistis el tri: sinjoro Lauri Laiho, Finnno antaŭe loĝinta en Melbourne, sinjoro Alois Chungsen, Ĉino el Nov-Gineo, kie li lernis Esperanton antaŭ kelke da jaroj, kaj mi mem. Ni disigis en Londono. Sinjoro Laiho reiris Finnlandon, kaj sinjoro Chungsen al Bristol por studi; la Bristolaj samideanoj lin bone akceptis, kaj li tuj sin trovis en rondo de amikoj.

—Mi vizitis Germanujon, kaj revenis trans Usono, en ĉiu loko mi rilatis kun la samideanoj, kaj multon gajnis per tio. Foje mi hazarde renkontis samideanojn, simple per portado de la verda stelo. En la fervoja stacio Hoko de Holando mi vidis surskribon 'Tie ĉi oni parolas Esperanton,' la konduktoro de la trajno, kiu prenis min al Germanujo, estas Esperantisto. En Barcelono mi vane serĉis la ĝustan stacion de la subtera fervojo (la plej bona subtera fervojo, kiun mi iam vidis), kiam mi aŭdis voĉon: 'Pardonu, sinjoro, ĉu mi povas iel utili al vi?' kaj ne konata samideano tuj gvidis min al la celata loko, per kio mi sukcesis trafi vagonaron por grava veturo.

—En Katalunujo, en urbo Vich mi denove vizitis amikojn, kiuj min gastame kaj sindone akceptis kiel en mia lasta vojaĝo en Eŭropo. Ni tre ĝoje rekuniĝis ĉe la stacio, kaj ili min kondukis al sia hejmo, kie mi havis

la saman ĉambron, kiel en antaŭa vizito. Kiom da domoj, pensionoj, bangaloj estis mia hejmo dum la pasintaj dek du jaroj, kaj jen mi revenas kaj denove okupas eĉ la saman lito, dum ekstere la noktogardistoj kantas 'Laudate estu Dio! La dua jam batis. Serena!' Katalunujo faras same sorĉan, logan efekton kiel ĉiam. Aferoj antikvaj restas flankon ĉe flanko de aferoj modernaj: Esperanto, radiotelefono, k.t.p.

—En Usono lingvaj diferencoj, ekster kelkaj detaloj, ne ĝenas Aŭstraliano. La dialekto, ekster la malaltaj klasoj, kiuj parolas en nazaj akraj tonoj, malmulte diferencas de la lingvo de Suda Anglujo aŭ la nia. Tamen mi volante akceptis helpon kaj konsilon de tre gastamaj diverenciaj samideanoj en la ĉefaj urboj, kiujn mi trapasis. En Los Gatos, en Kalifornio, mi vizitis lernejon, kies fervora direktoro, sinjoro Rogers instruas Esperanto al 65 junuloj, ĉefe filoj de la plej bonaj familioj de la ŝtato. La junaj Kalifornianoj mirinde kreskas: 14 jara knabo ŝajnas egale evoluinta kiel 18 jara ĉe ni. La pacifika homtipo, videble en Orienta Aŭstralio, estas ankaŭ multe vidata en Kalifornio.

—En Wellington, en Nov-Zelando, mi dankas al nia Prezidanto, sinjoro W. H. King, al delegito sinjoro Dust, kaj al nia malnova Melburna kunbatalanto sinjoro W. L. Edmanson, agrablan restadon en la tre bela (sed venta!) urbo.

—Pli ol ĉiam mi estas konvinkita pli la granda valoro de nia lingvo.

10 januaro 1927.

Kara Sinjoro,

Ĉi-kune mi enmetas dek-ŝilingojn kiel donacon per nia laŭdinda eta gazeto. Mi tute konsentas tiun opinion de F-ino Blyth pri la tut-kora sindonema laboro farata de la estimataj administrantoj de "la Suda Kruc." Damage estus se la Esperantistaro ne daŭrigus plene meritan subtenon por nia sola Aŭstralazia gazeto. Sen ia dubo la verkita enhavo bone komparas eĉ ofte superas aliajn Esperantajn ĵurnalojn. Tial mi petas al ĉiu Esperantisto fari sian eblon, kiel eble plej multe, el-levi la monoŝarĝon el la ŝultroj de niaj fidelaj laboristoj kaj verkistoj.—Sincere la via

W. A. SAMIDEANO.

KRONIKO.

AUCKLAND, NOV-ZELANDO.

Tiu ĉi urbo suferas grandan perdon, kvankam Aŭstralio per tio gajnas! Ĉar nia altestimata kaj fervora samideano sinjoro R. J. Crago, foriris de nia marbordo vojaĝinte Aŭstralion. La novaĵo de la foriro venis kiel surprizo; kaj sendube Nov-Zelandoj kaj precipe Auklandanoj, havas rajton bedaŭri la perdon de sinjoro Crago, kiu nedisputeble donis al la movado en tiu ĉi loko ferman bazon. Estas neeble . . . spaco ne permesas . . . tie ĉi rekordi ĉion kion sinjoro Crago faris por Esperanto en Nov-Zelando, sed notinda estas lia laboro rilate la revivigon de la Auklanda Esperantista Asocio; lekcioj de Radiostacio IYA; kaj la gvidado de ĉiusemajna leciono tra la kolonoj de la "N.Z. Pictorial Weekly." Ĉiu volu al "La Vaganto" sukceson en lia nova sfero.

WELLINGTON, NOV-ZELANDO.

—Skribtempe novaĵoj nin atingis ke la 6a Kongreso ne okazos ĉe Hobarto, tion ni multe bedaŭras, samtempe esprimante konfidon al la Kongresa Komitato.

Estis plezuro dum la kristnaskaj libertagoj ricevi viziton de tiaj malnovaj geamikoj, kiaj gesinjoroj J. L. King, el Gisborne, kaj la fratoj McGuigan el Mangahao-Hydro. Bonega artikolo (plena kolono ampleksa) pri la Esperanto-Movado aperis en gazeto en la Nov-Zelanda cefurbo je 3a januaro. La artikolo kiu bonege traktis ĉiujn progresojn de la lingvo estas eble la plej bona, kaj plej amika iam presita en Nov-Zelanda gazeto. La deligito kaj videligito de la U.E. A. nun sin okupas pri la kapkalkulo de la Nov-Zelandaj Esperantistoj; kiel petita en la "Alvoko al la Tutmonda Esperantistaro" publikita en la oktobra eldono de "Esperanto." La adreso preparita dum 1926 de sinjoro W. H. King, la Esperantistaro de Nov-Zelando nun nombras pli ol 300. Unu Esperantisto kiam li sciigis ke en Nov-Zelando troviĝas tiom da samideanoj ridegis dirante ke, "estas miloj"; sed, se jes, la nomoj de la miloj ne estas senditaj al sinjoro King, kiu diligente kaj arde dissendis cirkulerojn tra la tuta lando. La skribanto de tiuj ĉi linioj atestas al la multaj Esperantistaj geamikoj en Nov-Zelando kaj Aŭstralio la ricevon dum Kristnasko kaj Novjaro de mul-

kaj leteroj, telegramoj kaj kablgramoj ankaŭ de Kristnaskaj donacoj, inter kiuj troviĝis granda kuko kun verda stelo kaj bonvola frazo esperante skribita, pro kio speciala danko estas esprimita.

SIDNEY, N.S.K. — Pri progreso en la movado ĉi-tie mi ne povas raporti multon, kvankam ni festis tre sukcesan "Zamenhof-Vesperon" laste monate. Pli ol 70 personoj ĉeestis kaj ni havis Esperantan teatraĵon, dekduojn kaj kantojn. En la ĵurnalararo ne multaj priesperantaj artikoloj aperas, sed kiam okazo sin prezen- tas, ni propagandas laŭpove. Ek- ample, lastan semajnon mondvaganta cikletisto el Riga, nomata Kotulski, revenis en Sydney, post biciklraĵo de Townsville, kaj, i.a. diris, ke kvan- kam li lernis Esperanton antaŭ la komenco de sia vojaĝo, li nun spertis, ke Angla estas la mondlingvo kaj nun nur uzas ĝin. Mi tiam tuj skribis respondon citante la faradojn de la E.A., kaj oni represis ĝin la saman tagon, sed—nur en unu eldono! Je la okazo mi sendis leteron al la Sydney Morning Herald" pri la sinaŭgurita Transatlantika Tele- nado. kiun mi tre zorge ellaboradis, sed oni evidente ne konsideris la te- son alloga kaj ĝi ne aperis. Tio es- as la sorto!

MELBURN. V. — Tre interesa parolado estis brodkastita de 3LO je januaro unua. La parolinto sro. Maur- ce Hyde, kiu antaŭ ne longe revenis Melburnon post vojaĝo en Eŭropo kaj sono, donis bonan rakonton pri la kazintaĵoj dum la vojaĝo. Estus agreble al la aŭskultantoj se plua parolado sekvos tiun.

La postaĵo, dum la monato, ĉe la ĉambroj de la Melburne Esperanto Societo, sro. Scurrie legis du-aktan komedieton, kiun li mem verkis.

La ĉiunonata debato sukcesis bone. La temo estis "Loĝado en la kamparo kontraŭ loĝado en ĉefurbo." La sub- stantaĵo por "Loĝado en ĉefurboj" gajnis.

MELBOURNO, V. — Dum decem- bro fotografaĵo de d-ro Zamenhof kaj artikolo pri internacia lingvo, aperis en la lerneja ĵurnalo. F-ino N. Byatt legis paroladon pri tion, al ĉirkaŭ 90 lernantoj ĉe la "Domestic Arts School" Footscray. Pro la intereso montrita, f-ino N. Byatt esperas fondi grupon por studi Esperanto en la venonta jaro.

BRISBAIN - QUEENSLAND. —

The Zamenhof Evening.

We engaged a social hall attached to one of the cafes and arranged that the cafe cater for a hand-round supper. The expense was met by special subscriptions amongst the Class and Club members. We attended at the hall the previous evening and put up decorations which we had prepared in readiness. The result was really pretty and made a lovely setting for such an evening. There were the usual coloured streamers, shaded lights, and delicately tinted paper chains of many colours, but in addition there were special Esperanto signs, and art cards here and there with the inscription: "La verda stelo brilas sur la ruinojn de la Babelturo." The screen at the back of the plat- form bore a big Esperanto flag and a notice "Ni memoru Zamenhof." These were wreathed in foliage and flowers were placed at the foot. "Bon- venu" greeted people as they entered, and a sign "Feliclan Kristnaskon" was suspended from the central decora- tions. The pillars were encircled with trails of fern and flowers. And every- where, intermingling with the decora- tions, were green Esperanto stars of all sizes. A special table held Es- peranto periodicals from various parts of the world.

I come now to the eventful even- ing. Mr. Staines (our President) and his wife welcomed the guests—who numbered about 50. Two press rep- resentatives were in attendance. The opening speech by Mr. Staines dealt briefly with the life of Zamenhof and the progress of Esperanto, and also with a summary of the grammar.

Considerable talent was displayed in the various concert items and the whole programme was carried through without a hitch. I had had fears con- cerning the success of the community singing, but that part of the pro- gramme was entered into with heart and soul—not to mention voice—and proved a great "hit." All were pro- vided with song sheets and even those who didn't know the tune of "La Espero" quickly picked it up and sang with gusto. The words the strangers sang for the various Esperanto songs would have made you take a fit laugh- ing. That all present were put into a thorough good humour is beyond question.

A touching little incident of the evening was the presentation of Miss Fraser's portrait by little Alison Tait (her grand-niece). The picture was entitled "The Little Mother of the Brisbane Esperanto Club." We are all very proud of Miss Fraser. She kept Esperanto alive in Brisbane and was a friend to all of us. Her memory lives with us as a constant inspiration to further effect.

After the supper the evening became informal. The time was all too short for the competitions, dances, etc., we had planned. One competition was particularly amusing—a very simple one which I adapted to Esperanto purposes:—

The Competition.

This little bag contains 12 grains of corn. If you should answer: Yes, No, Black, or White, or the Esperanto equivalents, to any question asked you during the evening, you must pay a grain of corn to your questioner—but only if questioner notices the mistake.

Additions may be made to your store of corn by watching for similar mistakes in reply to your questions.

A suitable prize will be given to the person who at 10 p.m. has accumulated the largest quantity of corn.

The "suitable prize" (kept a secret till the last) was a little bantam and her chick (both beauties in their own way)—and you can guess the fun and the way the folks flocked around with donations of corn to the winner. That competition was commenced during supper, and the usual questions at that time gave plenty of chances to catch the unwary.

We finished with "Auld Lang Syne" (in English—or Scotch), with linked hands in the customary manner, and thus concluded a very happy evening.

RAILWAYMEN AND ESPERANTO.

Esperanto has already rendered important services to tourists. It is, therefore, easy to understand, that it is increasingly interesting railway employers.

The last Congress of the Swiss Federation of Railwaymen at Berne on 3rd and 4th July, 1926, adopted the following resolution:

The Congress approves the movement in favour of an international auxiliary language. It recommends to members of the Federation the study of Esperanto, which occupies a foremost place at this moment.—I.E.S.

LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

Estimata amiko,

Se vi petus informon de civitano Melburna pri la kondiĉoj de indiĝenaj bestoj en Viktorio, vi certe ricevos la respondon, ke ili estas preskaŭ ĉiuj ekstermitaj. Sed konversacio kun sinjoro Lewis, la estro de la fiŝo kaj ĉasaĵo protekta departemento, malkaŝis, ke la kangurao de diversaj specoj, la didelfo, kaj la ornitorinko almenaŭ plimultiĝas en la lastaj 20 jaroj.

Estas vere, ke la indiĝena Koala (senvosta, poŝhava arbobesto, havanta lanecan pelton) matmultigas; ĉar, kiam la kangurao saltegas rapide for de la arbaraj bruloj, kaj la didelfo saĝe eniras kavan arbrunkon por savi sin, la milda kaj iom nesaga Koala restas en la arbsupro, ĝis la brulo atingas kaj brulmortigas ĝin. Se la Koala estus pli saĝa ĝi scius, ke familio kiu naskas nur unu idon en jaro, ne povas akcepti tiun riskon.

Kanguruoj kaj didelfoj tiel abundas en Viktorio, ke la fiŝa kaj ĉasaĵa departemento ĉiutage ricevas petojn kaj donas permesojn al suferigitaj bienistoj por mortpafi definitan nombron el la bestoj por konservi ties rikoltaĵojn.

En la oficejo de sinjoro Lewis pendas landkarton, kolorita je la distriktoj, kie permesoj estis donataj. Almenaŭ 40 koloritaj lokoj aperas sur tiu landkarto, kaj montras distriktojn kie la kangurao tiom plimultiĝis, ke ili detruas la vivrimedojn de la bienisto. Kaj simila landkarto pri la didelfo estas preskaŭ ĉie kolorita.

Kanguruoj abundas de Patchewoi-ŝiok en la nordoriento, ĝis Portlano en la sudo, en tuta Gippsland kaj la montaro Grampians; kaj de montro Buffalo oriente al la landlimo de Nova Suda Kimrujo. Kie ajn troviĝas herboriĉa valo, simile al tiu tra kiu fluas la riveron Macalister, la kanguruoj kolektiĝas kaj detruas la kreskantajn rikoltaĵojn.

Bariloj ne malhelpas ilin; nenio efikas krom permeso de la fiŝa kaj ĉasaĵa departemento. Tiuj ĉi dokumentoj rajtas la bieniston mortigi ĉirkaŭ 10 bestojn, kio sufiĉas averti la ceterajn, ke tiu bieno estas danĝera loko por kanguruoj.

Tiel forpelitaj la ceteraj kanguruoj reiras al la praarbaro, kaj pro timo ili tie restas dum eble du aŭ tri monatoj. La feloj de tiuj kiuj estas mort-

patitaj devas esti stampitaj, kaj venditaj tra definitaj agentoj, por forigi la ebロン, ke bienisto mortpafu tro multe el la bestoj.

—Se oni provus vendi al peltisto kontraŭleĝe havigitan krudan pelton, oni baldaŭ vidus, kiam tiu senceremonie surstratigis lin kun la felo, ke la monpuno estas tro granda, kaj la observado tro severa por permesi kontraŭleĝan vendadon de la feloj de protektitaj bestoj.—diris sinjoro Lewis. Tio ĉe Quenscliff (banloko ĉe la enirejo de golfo Phillip) dimanĉon vespere, kiam aro da salmo pelis la pilĉarbojn ĝis la marbordo inter la sinbranantoj. Kelkaj el la sinbranantoj mane kaptis kelkajn salmojn. Unu viro rapidis hejmen kaj revenis kun fisstango per kiu li sukcesis kapti 20 salmojn en nur kelke da minutoj.

Rimarkinda historio de knaba heroeco estis rakontita en Sidney juĝejo, kiam oni faris enketon pri la morto de knabo, kiu estis mordmortigita de ŝarko.

Mervyn Allum, knabo aĝa 15 jarojn, estis atakita de ŝarko dum li naĝis renkonti boaton, kaj mortis de la teruraj vundoj, kiujn li ricevis.

Stanley Gibbs, knabo aĝa 16 jarojn, kiu kampeloĝis ĉe Port Hacking, diris ke li kaj kelkaj amikoj estis en motorboato, kiam li aŭdis kriegon.—Ekrigardinte mi vidis la ŝarkon dum ĝi sin turnis dorsen. La ŝarko estis tiam tre proksime al Allum. Estis renio por indiki, ke la ŝarko jam mordis lin. Mi saltis en la akvon kaj naĝis por helpi lin. Kiam mi atingis Allum la ŝarko estis apud li. Allum estis konscia. Mi petis ke li donu al mi la manon. Tiam mi povis vidi la ŝarkon sub la akvo. Guste kiam mi atingis Allum mi vidis sangon. Li donis al mi la manon tre malforte. Kiam mi prenis lian manon la ŝarko denove atakis lin, kaj tiris lin suben en la akvon. Je tiu tempo mi staris sur la ŝarko. Mi piedbatis ĝin por timigi ĝin, kaj penis preni ĝian naĝilon per la alia mano. Mi penis naĝi al la marbordo. Mi pensas ke la ŝarko revenis tiam

kaj tiris Allum'on for de la marbordo kaj sub la akvo. Allum estis senkonscia, kiam li denove aperis. Sinjoro Campbell tiam alproksimiĝis en remboato. Ni levis Allum'on en la boaton, kaj mi remis al la marbordo.

Policano diris: —Mi vidis la tragedion de malproksimeco de 300 jardoj: Mi vidis knabon nagantan renkonti boaton. Subite ŝarko naĝis ĉirkaŭ lin, kaj ŝajnis el salti el la akvo kaj super la naĝanto. Gibbs saltis el la motorboato, kaj la ŝarko estis sub liaj kruroj. Mi vidis Gibbs pugne bati kaj piedbati la ŝarkon.

Doktoro Sheldon diris: —La morto rezultis de ŝoko sekve de teruraj vundoj al la maldekstra femuro kaj kruro.

Kronikante verdikton laŭ la atesto de la doktoro la juĝisto diris: —La kuraĝeco kaj sindoneco de Gibbs meritas la ricevon de la Krucvo Viktoria,— (la plej alta rekompenco pro kuraĝeco, kiu estas donebla al Briteno). —Mi certe raportos la aferon al la Reĝa Humana Societo.

En tiaj mallongaj, malmultvortaj frazoj, aperis la raporto en la matena ĵurnalo, raporto de tia kuraĝeco kaj heroeco, kia superegas la kuraĝecon de herooj priskribitaj de la poetoj. Tiuj, kiuj konas la ŝarkon, plivolante piedbatus kaj pugnefrapus leonon ol ŝarkon.

Samideane salutas vin, P. H.

THE POST OFFICE AND ESPERANTO.

The Commissary of Post, Telegraphs and Telephones of the Soviet Union, by a special decree of 17th June 1926, (No. 6/304) admitted Esperanto to the number of languages permitted for telegrams in Russia.

We take this opportunity of reminding our readers once more that, from 1st November, 1926, Esperanto is officially recognised as a clear language in the international telegraph service.—I.E.S.

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj

Se vi havas kriptan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM Aŭ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE MELBOURNE.

"INTERNACIA INFANARO.

"Internacia Infanaro" estas verko de s-ino Seriševa, instruistino de etuloj en Siberio. Tiu ĉi libro por la unua lernojaro celas lernigi Esperanton senpere, sen ia traduko aŭ gramatika regulo, nur per iom post ioma pasado de unua encerbigaĵo al dua. La sukceso de la libro en Sibirio, kie la aŭtorino ĝin verkis, kaj en Italujo, kie oni eldonis ĝin, jam pruvis ĝian bonecon. Multaj bildoj, kelkaj koloritaj, dika klara preso, bona ordo de la sinsekvaj lernotaĵoj, ridigaj rakontetoj, poezietoj, dialogoj, kantetoj, ĉio estas taŭgcele elektita de sperta kulturisto de infanmensoj.

Tamen malgraŭ ĝenerala kontentigo du-tri neindaĵoj montriĝas. La bindaĵo estas malforta; la ilustraĵoj krudaj (precipe ĉe paĝo 23) kaj donas malnetan aspekton al la paĝoj. Preseraroj troviĝas en lokoj nerimarkigataj en prierara aldonpaĝo, kaj iuj vortoj estas neĝuste uzitaj. Ekzemple, (paĝo 20) "manego" devas esti "hunda pied(eg)o." (21) "bot(eg)o" "su(eg)o." (23) "Mono" (monero). (34) "lingnojn" (lingnopoĉojn"). (37) "grandega sonorilego" estas superfluaĵo. Tio malŝparas la forton de nia lingvo. Vere estas, ke Zamenhof en Georgo Dandin uzis "maneteton," sed tio estis por speciala efekto. (65) "vekigi" devas esti "veki" laŭ Kabe, Milledge kaj aliaj. Je 23/4 kaj 68/11 du formoj de la sama vorto "pantaleno" troviĝas. (56/13). Estus bone imiti Zamenhof, kiu en sia plilasta verkaro ĉiam uzis grandliterojn por derivaĵoj de propraj nomoj. Ĉiam uzi grandan "E" por "Esperanto" kaj ties derivaĵoj bone malhelpas eblan malkomprenon pro ekzisto de "espero." (73/14) "kantanta" estas la ununura partecipo en la libro, kaj supozeble tion la lernanto ne komprenas, ĉar li ne ricevas instruon pri la partecipoj en la paĝoj subkritiko.

Esperable oni forigos el tre utila libro tiujn difektojn por dua eldono. Tio rajtas aperi siatempe, ĉar ankaŭ por kursoj al nekleruloj per rekta metodo la libro certe estus profito uzebla, kaj bezonvoko devus aŭdiĝi el tiuj rondoj.

ROBO, Melbourne.

SIXTH AUSTRALASIAN CONGRESS.

Hobart samideanoj very much regret having to disappoint all those intending to visit Hobart next Easter for the proposed Congress. Owing to the visit of the Duke and Duchess having been fixed for the Easter holidays (in spite of local efforts to have same cancelled) it was felt that a Congress held at a time when everyone's attention would be fixed on the general festivities would meet with little success, and it has therefore been decided to cancel the Congress at Hobart. This decision has been reached after consultation with the Societies in the larger centres, who were notified directly the date of the Royal visit was finally settled. The proposal has been made to hold the next Congress in Melbourne in 1928, and Hobart members are willing to fall in with this arrangement if decided upon. In the meantime, if our friends from elsewhere care to come to Hobart for their Easter holiday they may be sure of a hearty welcome.

—Hobarta Esperanta Grupo.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Argentina Esperantisto, 5, 6; Amerika Esperantisto, 1, 2; Arbeiter Esperantisten, 10-12; British Esperantist, 260, 261; Brazila Esperantisto, 5-8; Bulteno Antverpena, 10, 11; Der Arbeiter-Esperantist, 11; Esperanto, 314, 315-316; Espero Katolika, 24, 25; Heroldo de Esperanto, 55 ĝis 62; Holanda Esperantisto, 6, 7, 8, 9; Internacia Esperanto-Servo, 11; International Language, nov, dec, jan; Internacis Medicina Revuo, 6; Konkordo, 10; La Unuigita Tuthomaro, nov, dec; La Suno Hispana, 113, 114, 115; La Lernanto, 42; Le Monde Esperantiste, 6; Libera Laboristo, 5; La Revuo Orienta, 12; La Progreso, 8, 9; Novaĵo Tempoj, 11-12; Oomoto, 20, 21; Oomoto Internacia, 11, 12; Pola Esperantisto, 7-8, 9-10; Pacifika Espero, 17, 18; Rivesta del Ateneo, 28; Svenska Esperanto, 10, 11; Verda Stelo, 1, 2.

Dr. Adam Zamenhof, son of the late Dr. Ludwig Zamenhof, inventor of Esperanto, has been appointed Head of the Eye Department at the Jewish Hospital in Warsaw.—Jewish Chronicle, 15 Oct.

CLUB CELEBRATION.

Pastel tinted cables and trails of asparagus plumous decorated the Wattle Cafe on Saturday night when members of the Brisbane Esperanto Club held a celebration in memory of the late Dr. Zamenhof, author of Esperanto, the anniversary of whose birth occurs this week. The green and white flag bearing the green star of Esperanto was prominently displayed on the platform together with the inscription "Ni memoru Zamenhof" (let us remember Zamenhof), while "Bonvenu" (welcome) greeted visitors at the door.

The guests were received by the president of the club (Mr. A. Staines) and Mrs. Staines. Mr. Staines subsequently conveyed a formal welcome and detailed the beginnings of Esperanto, and the difficulties which its author, who was born in a little Polish town, had to overcome. The first society or club was formed at Nuremberg, Germany, in 1883, and the second in Sweden in 1891. To-day messages in Esperanto were broadcast in Great Britain and European countries and in many countries the teaching of the language was compulsory in the schools.

An enjoyable programme was contributed by Mrs. Benussi, Miss King, Iorna Anderson, R. Macpherson, E. Chalmers, G. Carrick, Doris Wright, Eva Bowen, and Alison Norris.

A presentation of a portrait of Miss M. Fraser (late President) was made to the club by her grandniece, Miss Alison Norris.

Among those present were Messrs. James R. Tate, Crookall, Wright, C. Kidd, and Sunholm, Misses A. E. Jones, McDonald (2), Schoch, I. Alphen, Rosender, and Dorothy Crookall, Messrs. H. Love, Bencken, L. W. K. Wirth, Wiles, A. Alphen, and Baker.

—"Brisbane Telegraph," 13/12/26.

En esperanto estas nur: a) unu stila regulo: skribi plej klare. Kio estas klara, tio povas esti nekorekta, sed neniam malbona; b) unu malpermeso: skribi malklare. Kio ne estas klara, tio povas ifoje esti korekta, sed neniam bona.

Th. CART, prezidanto de l' Akademio Esperantista.

WIRELESS AND ESPERANTO.

A resolution unanimously adopted by the Congress of Czech Wireless Amateurs at Brunn (Brno) on 30th May 1926, illustrates the continually increasing interest in Esperanto in wireless circles. The following is the text of the resolution:

In view of the resolution adopted by the 1st Congress of the International Union of Wireless Amateurs in Paris on 16th April 1925; and

In view of the obstacle to international relations constituted by the diversity of languages;

We have decided to recommend to all Czech wireless amateurs the study and use of Esperanto, an auxiliary language facilitating mutual comprehension, for the emission of wireless messages and for giving the sense of newspaper article and speeches at congresses. The same recommendation is made for wireless communications in all cases in which the correspondents are not in a position to make themselves understood through the medium of national language.

A similar resolution was adopted at the First Pan-sovietic Congress of the Society of Friends of Wireless in Moscow, recommending that the broadcasting courses in Esperanto and lectures from the principal stations should be systematically organised. The resolution also contains a recommendation to wireless newspapers to reserve a page for the teaching or the use of Esperanto.—I.E.S.

SCIENCE AND ESPERANTO.

The distinguished psychologist, Charles Baudouin of Geneva, has recently written in Esperanto a work on "The art of self-discipline" (psychagogie) which has now been published by Mosse of Berlin. —I.E.S.

A GREAT ESPERANTO
DICTIONARY.

The appearance of the 3rd volume of the great Esperanto-German Encyclopedic Dictionary of E. Wustar is announced among the publications of Hirt and Son of Leipzig, who have already published a large number of works in Esperanto, including translations from Hungarian, Catalanian, Russian, Polish, Bulgarian, Japanese, etc. —I.E.S.

RAILWAYMEN & ESPERANTO.

The Central Office for the utilisation of railwaymen's spare times, attached to the General Directorate of Italian State Railways, has decided to authorise officially the inclusion of Esperanto in programmes of classes for railwaymen. —I.E.S.

THE POSTAL, TELEGRAPH AND TELEPHONE EMPLOYEES' CONGRESS AND ESPERANTO.

Esperanto is widely diffused among postal, telegraph and telephone officials. The last congress of the P.T.T.—International, which was held in Paris in the month of October, voted a subsidy to "Interligilo," the organ of the International Esperantist League of P.T.T. employees (Ilepto). The congress also adopted a report on the progress of Esperanto in postal matters. —I.E.S.

Dear Mr. Editor,—Just a word of encouragement and appreciation as I am sending along my small contribution, 5/-. It seems to me that being an Editor is sometimes a thankless task, but perhaps it is only for want of thought on our part. If the paper is not exactly to our mind, let us all do our best to improve it—make suggestions and take an interest in things. It pleases me and I always look forward to receiving it, but the very least we can do is to pay our subscription promptly and regularly, especially when the Editor undertakes his onerous task without any remuneration. I quite agree with the sentiments of Miss Blythe, and hope that others will follow the good example she has set.

Wishing the paper every success and yourself and all its readers a Happy New Year.—I am, Yours etc.,

OLD SUSCRIBER.

BARGAINS IN BOOKS.

We have on hand a few of the following books, which we are now offering at special bargain prices.

LILIO (Sinnotte). Limited number only. 2/6.

PRO ISTAR (Luyken). We can recommend this. 7/6.

LA FARAONO (Kabe). Three volumes. 10/-.

INTERROMPITA KANTO (Kabe). A charming story. 1/3.

THE BIBLE complete 8/6, 10/6, 15/-.

Send stamp for full price list.

Include postage when ordering — 1d. for each 1/-.

Melbourne Esperanto Society, Box 731f, Elizabeth St., P.O., Melbourne.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunveno: Public Benefit Booterie Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste anud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. T. Simon, Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Hobart Esperanta Grupo. Kunveno: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A Beckett, 177 Davey-str.; Hobart.

Persista Grupo, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt. Sekretariino: F-ino I. Thomas. Kunveno kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.